# *Sesiis la lasta kunsido de la ministra konsilantaro de la jaro.*



Havano, 27 dec (RHK) Sesiis en la Palaco de la Revolucio de tiu ?i urbo la lasta kunsido de la ministra konsilantaro, kapita de la prezidento Miguel Díaz-Canel, kaj gvidita de la ?efministro Manuel Marrero Cruz.

Ampleksa labortago traktis esencajn aferojn de la vivo ekonomia kaj socia, kiuj havas grandajn sekvojn en la nacia realo kaj estas difinitaj en la strategiaj gvidlinioj de la registaro en 2020.

Je la parolfermo, la prezidento nombris kvar esencajn prioritatojn, nome, la ideologia batalo, fronte al la nuna koloniiga platformo, kiun oni klopodas trudi al ni kaj la agadoj de la usona registaro cele al senpresti?igo de la kuba Revolucio; alia estas la landa defendo; la intensa le?ofara laboro komencita por subteni la Konstitucion de la Respubliko; kaj la ekonomia batalo.

Pri tiu ?i lasta, li esprimis ke la jaro 2020 devas esti jaro en kiu oni entreprenu ?ion necesan por evoluigi la produktivajn fortojn, kion oni ne povas konfuzi kun privatigo, ?ar tiu ne estas nia vojo. Pro tio li insistis, ke oni detale analizos tion, kio estas necese senbarigi en la ?tata kaj privata sektoroj por ke la ekonomio kuba estu pli harmonia kaj dinamika.

Li alvokis ekigi la novan jaron kun la bona ritmo bezonata. Krei la kondi?ojn por bona jarkomenco, finkonstruante lo?ejojn, eksportante, enspezante al la ekonomio. Sekve, dum la venonta jaro oni sistemigos la rigorajn analizojn pri la ekonomiaj rezultoj.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/210713-sesiis-la-lasta-kunsido-de-la-ministra-konsilantaro-de-la-jaro

**Radio Habana Cuba**